# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 20/05/2021 Kvincenttridekunua eldono (unua eldono 20/09/2011)**




## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer
rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au


## Entute 812,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **281,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **234,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **210,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **86,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2021)

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*

## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).






N.ro 35 de "Por Komencantoj".

GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Ĉu prepozicio povas esti la kernvorto de gramatika subjekto aŭ objekto?


2). A. Kiu vortspeco estas ĉiam la kernvorto de predikato? B. Kial ne la infinitivo?

3). Ĉu kompleta propozicio (= frazo) povas ekzisti sen predikato?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 531. *Marcel Leereveld*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***



**La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.** http://esperantaretradio.blogspot.com.



T-ĉeloj prizorgas pli longan protekton 13a Majo 2021

# Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn.



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas de 10.30 atm ĝis 12tm la unuan kaj trian sabatojn de la monato. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater Cafe 28-29 Suda Stejno. Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. La ĉeestantoj tie diskutas la plej sekuran lokon por la kunveno laŭ la vetero kaj homamasoj. La 15a de majo estos la tria sabato. Venu!! *Roger Springer*



Bona kaj vigla renkontiĝo okazis lastan sabaton pro la bonvena vizitanto Doriso el Redferno. Ŝi pramŝipis tien kaj reen.

Ŝi konsentis ke la duonhora vojaĝo similas ferieton aparte de la okupata vivo.

Ni ĉiuj volas doni al vi, Roĝero multajn bondezirojn por via 90-a naskiĝtago.

Feliĉan feston kara Roĝero. *Chris Holliss*




***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917



# Ŝanĝo de maŝinskribado.

## EL DE ANTAŬ CENT JAROJ .

Antaŭ naŭdek jaroj mi, kaj ĉiuj homoj, skribis leterojn kaj raportojn kaj rakontojn permane, sed ni povis ankaŭ uzi simplan skribmaŝinon, kio iris pli rapide, pli legeble, Oni povis transporti tiajn maŝinojn ien ajn, ĉar ĝi ankoraŭ ne uzis elektron. Tio estis praktika, sed oni devis lerni uzi ĝin, ĉar oni ankoraŭ ne lernis tion en la lernejoj. Ekzistis studejoj, kie oni por mono instruis vin, sed oni povis ankaŭ mem studi la uzadon. La maŝino uzis veturantan rubandon trempitan de speciala firma inko, kaj la supren puŝataj literoj frapatis kun stangeto sur la rubandon kaj sur la paperon, kiu moviĝis de spaco al spaco. Teĥnikaj problemoj okazis nur ĉe la rubando, kiu povis elfali. Post certa uztempo, nome kiam la inko estis foruzita, oni devis aĉeti novan rubandon.



Antaŭ la dua mondmilito oni eltrovis la elektran skribmaŝinon, kiu funkciis pli sekure kaj pli rapide, sed la fundamenta funkciado restis la sama, kaj ĝi estis pli malfacile riparebla mem. Ĝi estis relative multekosta, do la ordinaraj homoj kutime plu uzis la neelektran. Ĉar ĝi estis pli facile traktebla, oficejoj normale uzis la elektran skribmaŝinon.

Sed estis post la milito ke oni inventis skribmaŝinojn kun pluraj ekstraj funkcioj. Tio estis granda pliboniĝo por havi maŝinon kiu samtempe registris kaj konservis la verkitaĵon. Oni ne plu bezonis korekti la verkitaĵon tuj post la verkado. Mi multe uzis tiajn skribmaŝinojn dum mia verkado de artikoloj kaj libroj. Dum en 1952 mi devis kompletigi ĉiun paĝon kiun mi tradukis antaŭ ol skribi la sekvontan paĝon, en la jaroj 1970 ĝis 1990 mi povis verki mian 300-paĝan gramatiklibron dum dudek jaroj, pro la novaj skribmaŝinoj retenantaj la tekston de ĉiu paĝo.

Kaj fine venis la moderna komputilo, kiu ne ŝanĝis la antaŭan funkciadon de la skribmaŝino, sed kiu ebligas facile ŝanĝi unu parton al alia, kaj kiu ebligas sendi la tekston ien ajn. Kaj eĉ tonigi ĝin.

Entute granda ŝanĝado en la uzo de la humila skribmaŝino. *Marcel Leereveld.*

## ĈU MI MEMORAS ĜUSTE?

Mi memoras, ke antaŭ nia vjetnama milito, kiam ankoraŭ ne aperis en la novaĵoj informoj pri danĝera Ĉinujo, aperis en la ĵurnaloj novaĵoj pri tio ke en Usono oni sekrete kreskigis tre potencajn kaj danĝerajn malsanojn por en militoj planti tiujn malsanojn en malamikajn landojn. Tiuj novaĵoj tre timigis la mondon, ĉar la malsanoj eble povus eskapi libere el la farejoj al aliaj landoj. Dum la usona vjetnama milito Usono praktikis tiajn malsanojn, kaŭzantajn multe da sufero al la vjetnama popolo. Pro tio la homaro tre timis, ke tiuj malsanoj en Vjetnamujo povus eskapi al aliaj landoj. Bonŝance tio ne okazis. Sed poste? *Marcel.*

## PRI AE 530.

En "Forgesu la facilecon!" Esperanta Retradio menciadas la malfacilecon de la Esperanta gramatiko, sed forgesas diri, ke la kaŭzo de tiu malfacileco ne estas la Esperanta gramatiko, sed precipe la fakto, ke la gramatiko de la eŭropaj lingvoj havas terurajn mallogikaĵojn kaj esceptojn en siaj gramatikoj. La granda plejmulto de tiuj kiuj lernas Esperanton faras tion sur la bazo de siaj aŭ lernitaj lingvoj eŭropaj. Infanoj kiuj lernas Esperanton antaŭ ol lerni eŭropan lingvon tute ne trovas la gramatikon de nia lingvo malfacila. *Marcel Leereveld.*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

**PRI AE 530.** Pri "Nia alianco kun Usono": Hitler, kaj nun Ĉinujo, penis uzi nin kaj multajn aliajn landojn kiel siajn koloniojn. Sed ankaŭ Usono faris kaj faras tion. Kial ne havi Hitler kaj Ĉinujon kiel niajn mastrojn, sed akcepti Usonon kiel nian, kelkfoje kruelan, mastron? Kial ne resti sendependa lando, kiel faris Svisujo kaj Svedujo? Kaj tiel ne fari stultajn militojn, en Irako, en Afganujo, kaj en Vjetnamujo? *Marcel Leereveld.*

# FELIĈAN NAŬDEKJARAN FESTON, KARA ROGER, KAJ MULTAJN DATREVENOJN PLU!


1931

1931 estis tre bona jaro, ĉar je vendredo la 22a de Majo, ĉe *St. Leonards,* Sidnejo, naskiĝis nia fidela, laborema, nelacigebla samideano, Roger Herbert Springer.

Agnoskendas, ke 1931 ne estis tute bona jaro mondvaste, sed iom sorte miksita.

En Usono, la Prezidento estis Herbert Hoover (Respubika partiano).
La Imperio-Ŝtato Konstruaĵo, (*Empire State Building*) la tiam plej alta en la mondo, estis oficiale malfermita en NovJorko.
La *Persteloj Briligita Standardo (Star Spangled Banner)* estis oficiale adoptita kiel la nacia himno - kvankam la vortoj estis verkitaj en 1814 kaj la muziko en la malfruaj 1700oj.
Kolonelo Jacob Schick inventis la elektran razilon.
Ho ve, tiu ankaŭ estis la jaro de ruinigaj senpluveco, polvoŝtormoj, grundo-erozio dum la tiel nomataj Polvo-Bovlo (*Dust Bowl*) jaroj kiuj kaŭzis masivan ekologian damaĝon al mezokcidenta Usono kaj tragedion al la homaro.

En Ĉinujo, la Flava Rivero-inundo mortigis ĝis kvar milionoj da homoj.
En Septembro, la Japanoj invadis Manĉurion... (La Ligo de Nacioj faris nenion.)

En la Unuiĝinta Regno la Ĉefministro estis Ramsay MacDonald (Laborista partiano).
Mahatma Ghandi vizitis ĝin dum kelkaj monatoj, pledante kaj petegante por Hindujo.

En Aŭstralio, la Ĉefministro estis James Scullin (Laborista partiano), kiu elektiĝis en Oktobro 1929.
Nur du tagojn post tiu elekto, okazis la Wall Strata Frakaso (*Wall St Crash*) kun la sekvanta tergloba Grandega Deprimo.
Jack Lang, fajreca maldekstrulo, elektiĝis per grandega nombro da voĉdonoj, Ĉefministro de NSK en la 1930a ŝtata voĉdono.
En Marto 1932 oficiale malfermiĝis la Sidneja Havena Ponto.



(Nia Roĝer ankoraŭ ne atingis sian unuan naskiĝtagdatrevenon.)
{Sed mi ĉeestis kun miaj gepatroj. Roger}

Kaj kio pri nia heroo? Ĉies vivo estas libro, kaj tiu de Roger estis kaj estas plenplena da aventuroj, laborego, ĝojo kaj kompreneble ankaŭ malĝojo de tempo al tempo. Liaj ontaj jaroj estu feliĉaj kaj kiom eble plej kontentigaj. *Vera Payne*



***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***


# Jen reago al la artikolo de Ken Rolls. (Vidu AE530)



En sia artikolo Ken Rolls montras ke krei fidindan objekton, kiu savos la vivon de multaj homoj postulas investi grandan sumon da mono , sed ĉu la situacio tute similas koncerne la vakcinon kontraŭ Covid -19? Ekzemple la malkovro de la



Moderna vakcino ne estas novaĵo de komenco ĝis fino. Ĝi baziĝas sur la esploroj faritaj en 1966 de la virusologo Barney Graham kaj lia teamo en la universitato Vanderbilt . Tiuj esploroj estis financitaj de la usona Federacio, do dank'al la mono kolektita per



la impostoj. La registaro kontribuis je $ 10,5 miliardoj por ke farmacia kompanio povu rapide proponi sekuran kaj efikan vakcinon , tio estas ankoraŭfoje mono kiu devenas el la impostoj . Laŭ mia kompreno en aliaj landoj la farmaciaj kompanioj ricevis similan helpon por produkti kun nekutima rapideco la savantan vakcinon . Ĉu ĝustas ke la farmaciaj kompanioj realigu grandan profiton aŭ ĉu la decido de prezidento Biden nur spegulas la interhelpon , kiu permesis rapidan produktadon de la vakcino? Ĉiukaze se ne estas solidareco inter la landoj , tiel ke mono ne estu baro al akiro de la vakcinado por ĉiu, ĉu vakcinado havos la deziratan efikon ?



Informoj troveblas en la retejo www. scientificamerican.com *Franciska Toubale*

**3ZZZ** … En la elsendo de la 17a de majo troviĝas instigo respondi la enketon de UNESKO pri la estonto kaj pli da informoj pri traktado aŭ bredado de bestoj …



….*Franciska Toubale*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)* **SOLVO DE LA KVIZETO 34**



1). Ne. Nur de adjekto.
2). A. La verbo (= vorto finiĝanta nur per –as, -is, -os, -us, aŭ –u). B. Ĉar ĝi ne finiĝus per –as aŭ –is aŭ –os aŭ -us aŭ –u, kaj ĉar ĝi ankaŭ funkcias kiel substantivo.
3). Ne,

*Marcel Leereveld.*

Kara Roger, mi laŭdas vian diligenton por progresigi nian movadon. Gratulon! *Trevor Steele*



Mapo de Ĉinujo

**Roger Springer,**
- la eldonisto de "Aŭstraliaj Esperantistoj",
- la fama sakŝalmludisto
- eterna esperantisto
havos 90 jarojn
Sabaton 22an de majo
Plej amike,
Heather, Indrani, Joanne, Jonathan, Sandor, Terry



***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***